

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Guido Holz

1. La luno nun ekhelas,
Steletoj oraj belas
En la ĉiela klar’;
L’arbaro nigra revas,
Kaj el herbejo levas
Mirige sin nebula mar’.

2. Silenta estas mondo
Kaj en krepuska rondo
Hejmecas kun favor’!
Similas kalman ĉelon,
En kiu vi kverelon
De l’tago dorme pelu for.

3. Ĉu vi la lunon konas?
Aspekto nur duonas,
Sed rondas ĝi en bel’.
Do ankaŭ estas multo,
Loganta al insulto,
Okulojn ĝenas la malhel’.

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

1. La luno nun leviĝis,
La steloj eklumiĝis,
Subiĝis jam la sun’.
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel
Hejmeca ĉambro, tiel
Trankvila estas ĝi.
Dormante ĉiun penon,
Aflikton kaj ĉagrenon
Dum nokta hor’ forgesu vi.²

3.) Jen staras ĉe l’ ĉielo
Tre eta fora stelo,
Sed tamen egas ĝi!
Ja estas ofte aĵo
Por ni nur ridindaĵo;
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

...

Matthias Claudius,
Vespera kanto

tradukita de Otto Bonte

1. La luno jam leviĝis,
Steletoj ekheliĝis,
Ravante homojn nin;
Silentas la arbaro
Kaj super la kamparo
Nebulo pala levas sin.

2. Ho, mondo la kvieta,
Kaj kiel ŝajnas eta
Krepuska en kovril’;
Por ke vi en ĉambreto
Samkiel infaneto
Senzorge dormu en lulil’.

3. Rigardu nun la lunon,
Vi vidas nur duonon,
Sed tamen ronda ĝi.
Ni ofte ion ridas,
Ĉar ni ne klare vidas,
Ke ĉie regas harmoni’.

...

² alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,
Forgesu la aflikton vi!

4. Ni homoj tiel vantaj Ja estas nur pekantaj, Malvasta nia sci'; Ĥimerojn ni eltrikas, Ni multe artifikas Kaj perdas celon pli kaj pli.	4.) Ni homaj fieruloj, Mizeraj ni pekuloj, Malmulton scias ni! Ni faras multajn aĵojn Kaj artajn elpensajojn, Sed vana estas tio ĉi.	4.
5. Vidigu, Dio, savon, Pasem' ne veku ravon, Ne ĝoju ni pro glor'! Fariĝu malafektaj Ni kaj al vi respektaj, Infane gaju nia kor'!	5.) La Dian savon vidu Ni nur kaj ni ne fidu je vanta iluzi'! Ni malfieraj iĝu, Ni ĝoju kaj piĝu, Infan-egalaj estu ni!	5.
6. Vi gracu, sen ĉagreni El mondo nin forpreni Al fin' per milda mort'! Kaj post forpren' fidele Hejmigu nin ĉiele, Sinjoro, Dio, nia fort'!	6.) Finfine vi nin prenu El tiu mond', ĉagrenu Ni ne pro tio ĉi! Kaj kiam vi nin prenos, Ho faru, ke ni venos En vian regnon, kara Di'!	6.
7. Kuŝiĝu do kun pio Vi en la nom' de Dio, Jam fridas nokta vent'. Per punoj, Di', ne ĝenu, Per dolĉa dorm' nin benu, Najbaron ankaŭ en turment'.	7.) Gefratoj, enlitiĝu, Trankvile endormiĝu! Noktiĝas ĉie ĉi; Vin gardos nia Dio. Li regas super ĉio. Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!	7. Ekkuŝu nun, gefratoj, De bona Di' ŝirmataj Kun tuta la homar'. Kar-Dio ne nin punu, Trankvilan dormon donu Kaj al malsana la najbar'!
...

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de GUIDO HOLZ (*1920 – †1989).*

Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)

Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1989-09-10.*

MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)

Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en “Esperanto aktuell 6/1984”.

*Traduko de la Germana poemo “Abendlied” de MATTHIAS CLAUDIUS (*1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)

Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en “Esperanto aktuell”, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj “Flavaj paĝoj”, sur paĝo 15 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de “Esperanto aktuell”, .